Jen ekzemplo tirita el la *Vocabulario de Latino internationale*, paĝo 5 : « Inter differente forma que habe nomen et verbo in latino, me elige forma magis simplice », kio signifas : « El la diversaj formoj kiujn havas la nomo kaj la verbo en latino, mi elektas la plej simplan ». La esprimo de la penso en tio ne gajnas ĉiam klarecon. Ekzemple mi tre dubas ke la latinistoj, el kiu ajn lando ili estas, komprenos facile la jenan frazon : « Es, in casu commune, mero absurdo ad cita latino nominativo », kiu, por Sro Peano, estas la traduko de tiu ĉi anglajo : « Is commonly a mere absurdity to cite the Latin nominativ ». Esperante : « Estas ĝenerale pura absurdo citi la latinan nominativon, t. e citi la nomojn latinajn sub la formo de l'nominativo ».

Sed estas rejunigo de l'latino pli atingebla de l'ĉiuhomaro, mi volas diri la *Latinon Komercan* de l'doktoro Colombo el Cannes (Francujo). Mi konfesas ke mi restis antaŭe skeptika pri tiu latino nova solene anoncita en la ĵurnaloj. Tamen, kiel sankto Tomaso, mi devis cedi al la evidenteco.

Tiu latino ekzistas, ĉar mi havis en miaj manoj ĝian gramatikon kaj mallongan vortaron. Gia aŭtoro diras ke li *eltrovis* ĝin en la ruinoj de Pompei kaj sur la popolaj enskriboj latinaj, kaj ke ĝi estas la vera lingvo, kiun parolis la Roma legiano kiu almilitis la mondon.

Nek la « graffiti » de Pompei nek la ceteraj enskriboj estis eltrovotaj. Jam de longe la arkeologiistoj ekzamenis ilin kaj la lingvistoj studis ilin kvazaŭ per lento. Sed ni ne insistu kaj ni iom rigardu la verkon de l'doktoro Colombo.

Unue la elparolado. La *y* elparoliĝos kiel la *ü* germana. Cu estas vere ke « la legiano kiu almilitis la mondon » kaj kies lingvon ni devas revivigi, posedis tiun sonon *ü* ? La romanaj lingvoj ŝajnas nin instrui pri la malo. — La silabojn *ce, ci* oni elparolos laŭvole aŭ *se, si* aŭ *ĉe, ĉi* ; tiu ĉi dolĉa libereco kontentigos kune la Italojn kaj la Francojn. Sed kion estus pensinta pri tio la legiano kiu diris unue *he, hi*,(1) poste *ce, ci* (elparolu esper. *ki*) ?

La latina deklinacio ricevas nenian simpligon. La aŭtoro nedire konservas ĉiujn neregulaĵojn kiel la vokativon *o fili* « o filo », la multonombrajn genitivojn en *um* kaj *ium*, la ununombrajn ablativojn en *i* kaj *e*. Sed tio estas komplikaĵoj de uzado, pri kiuj la plej rafinitaj el la latinaj gramatikistoj neniam interkonsentis. La doktoro Colombo bonvolas forigi la formon « deponentan » de l'verboj kaj modernigi la pasivon ; sed nur tion. Sed kontraŭe li komplikas la deklinaciajn finojn per cediloj, signoj, linietoj, sub preteksto distingi ilin kiam ili konfuziĝas. He ! ĉu li ne vidis en la ruinoj de Pompei kaj sur la diritaj popolaj enskriboj, ke la popoloj parolantaj latine sin okupis pri la deklinaciaj finoj kiel pri la malnovaj lunoj ?

Mi estus kruela se mi insistus pri la maniero tro fantazia laŭ kiu li instruas nin uzi la latinajn sufiksojn. Sed vere li mokas la publikon, dirante ke *barometrum* kaj *thermometrum* estas formataj kun helpo de la ila sufikso *trum*. — Laŭ tio, *barometro* kaj *termometro* signifus « ilo por *baromi*, ilo por *termomi* ! ! ! »

Restas la vortaro, kiu estas elprovilo de ĉiu lingvo. En ĝi oni trovas ĉion. Vortojn el pura literatura latino kaj eĉ poezia, kiel *coma* « hararo », *comis* « afabla » ; — ne malmulte da vortoj el popola malfrua latino, kiel *breviare* « mallongigi », *bassus* « malalta », sed tre ofte malĝuste, malkorekte kaj kontraŭsence. Ekzemple li tradukas *acquisitum* per « kvitanco », kaj tamen tiu vorto estas la patro de la franca *acquêt* « algajno » !

Pli la aŭtoro forgesis multegon de tiuj vortoj el la malfrua latino, kiujn li estus povinta legi, ne sur la ruinoj de Pompei, sed pli oportune en la etimologiaj vortaroj de Diez, de Brachet, kaj de multaj aliaj.

Oni trovas ankaŭ lingvaĵojn el la Provence (franca provinco) kiel *surcagare*, kiun la malfruaj Latinoj diris *supracarricare*. — Kion pensi pri *cavea*. kiu devas signifi kaj kaĝo kaj *kelo* ? Kion pensi pri *colletus* « kolumo », kies sufikso *etus* estas pure franca kaj provenc'a ?

Oni pardonu al mi tiun ĉi diron : la vortaro de la latino komerca estas fimiksaĵo.

Se almenaŭ ĝi estus kompleta ! Sed ĝi enhavas nur tri aŭ kvar mil vortojn (mi ne diras radikojn). Gi eĉ ne sufiĉas por diri : « Mi havas bonan tabakon en mia tabakujo ».

La serĉado mem de vortoj de la popola latino (kiun oni konas tiel malperfekte malgraŭ ĉiuj graffiti) estas kulpo. Gi povus eble, sin apogante sur maltimaj hipotezoj, liveri al ni karikaturon de etimologia lingvo el kiu resendus sian figuron la franca, provenc'a, itala kaj hispana lingvoj, t. e. ĝi liverus al ni eble tiun senekzistan « romanan » lingvon kiun la Provenc'ano Raynouard imagis ĉirkaŭ la jaro 1840a kaj eble tion volis la Provenc'ano Colombo.

Sed sub la kondiĉo tamen ke tiu laboraĵo estos farita pli zorge, pli konsekvence kaj pli metode — kaj precipe sub la kondiĉo ke la gramatiko de la latino komerca estos refarita de l'komenco ĝis la fino kaj liberigita de la kiraso de klasika latino, en kiu sufokiĝas la moderna penso.

Kaj kia estus la rezultato ? Tia lingvo forgesus ke la plimulto ol la antikvaj vortoj nune internaciigitaj apartenas ne al la popola latino, sed al la klasika latino kaj al la greko. Nek la Germanoj, nek la Rusoj komprenus preskaŭ nenian vorton en ĝi. Kaj eĉ la novlatinaj popoloj, por kiuj solaj ĝi estus kreita, rekonus en tiu novaĵo nek sian lingvon nek la latinon kiun ili lernas en lernejoj.

Por ke la latino estu modernigita, bezonus :

1e Ke oni plene refaru ĝian tutan gramatikon kaj oportunigu ĝin al la moderna pensomaniero, alprenante la gramatikajn principojn de la ĉefaj nunaj lingvoj de Eŭropo.

2e Ke oni malembarasigu ĝin pri la tri kvaronoj el ĝiaj vortoj iĝintaj sen utilo, ĉu ĉar ili esprimas mortintajn ideojn, ĉu ĉar ili duope aŭ triope signifas la samon.

3e Ke oni anstataŭas multajn aliajn vortojn per vortoj aŭ francaj aŭ germanaj, aŭ alilingvaj, kiuj fariĝis internaciaj en la tuta Eŭropo kaj Ameriko.

4e Ke oni empuŝu en ĝi, kiel novan sangon, milojn da vortoj necesegaj por esprimi modernajn objektojn aŭ novajn ideojn, kiujn eĉ ne povis antaŭvidi nek la latinaj klasikuloj, nek la roma legiano kiu almilitis la mondon.

Tio estus grandega, pezega laboro, kiun neniu ĝis nun serioze entreprenis.

Kaj se oni entreprenus ĝin, kio fariĝus ? Tute nova lingvo, kiu tiel diferenciĝis de la latino kiel esperanto mem. Tio estus aŭ kopio, aŭ imitaĵo, aŭ karikaturo de esperanto.

Kial do entrepreni, ĉar esperanto ezistas ?

CH. LAMBERT.

(1) Komparu germane *kaiser* (cœsar), *herker* (carcer), ka.

DIVERSAĴOJ

Nia samideano Doro Saquet, el Nantes jus estas nomita sekretario ĝenerala por Okcidenta Francujo de la Delegacio pri elekto de internacia helpanta lingvo.

Ĉiuj niaj gratuloj iras al nia kolego pri tiu ŝatinda kaj meritita distingaĵo.

Ni forgesis anonci la *centan* abonon al Esperanto. Oni memorigas nin pri tio : ĝi estis Fraŭlino Le Bozec du Quillio, en Lorient, al kiu ni sendis 100 poŝtkartojn kiel premio.

Nun alproksimiĝas la *ducenta* : ĝi estis baldaŭ sur niaj paĝoj !

Demando

Kara Samideano,

Ĉu vi ne kredas ke la bona rimedo por propagando estus, ke la ĉiulandaj literaturistoj partianoj de l'Esperanto, enkondukos en siaj nacilingvaj imagaj rakontoj, epizodojn, kie personoj gajnis profitegojn el la uzado de Esperanto ?

Ĉu vi scias ĉu estis farita ia provo en tia vojo ?

E. B.

La fama verkisto Jules Verne, kelkan tempon antaŭ sia morto, entreprenis fari rakonton en kiu Esperanto estus ludinta ĉefan rolon ; sed li mortis, kaj ni ne aŭdis plu ion pri tia bonega ideo.

Komercaĵo

Ni ricevis jus beletan reklamon esperantan pri komerco de Fiŝkonservaĵo de Sro Duchochois, vicprezidanto de l'Grupo Esperantista de Boulogne-sur-Mer.

Letero de Dro ZAMENHOF al Sro SCHNEEBERGER

pri la dua universala kongreso de Esperanto en Svisujo 1906

Kara sinjoro !

Kun granda plezuro mi legis en via letero, ke la svisaj esperantistoj decidis inviti la IIan kongreson en Svisujon. Tre bone, bonege ! Svisujo, kiu, ne havante ian nacian lingvon, estas la plej neŭtrala lando en la tuta Eŭropo, estas la plej bona loko por kongreso neŭtrale-homa, kaj mi esperas, ke tie ĉiuj esperantistoj sentos sin bonege. Mi eĉ antaŭvidas, ke venos iam la tempo, kiam Svisujo fariĝos la natura konstanta centro de la tuta esperantistaro.

Mi persone ne povas nun decidi, ĉar la decidado pri la kongreso apartenas nun al la « Komitato de Organizado » elektita en la unua kongreso ; sed mi esperas, ke la komitato nenion havos kontraŭ Svisujo kaj akceptos la inviton de la svisoj kun plej granda plezuro kaj danko.

Mi esperas, ke la svisaj esperantistoj faros ĉion kion ili povas, por bonege prepari la kongreson kaj fari el ĝi imponantan grandiozan manifestacion de interpopola frateco, grandan feston, en kiu krom la esperantistoj partoprenos ankaŭ miloj da neesperantistoj, kiuj venos kiel gastoj serĉantaj impreson kaj foriros entuziasmigitaj kaj esperantigitaj. Mi esperas, ke la svisaj esperantistoj nun ofte kunvenados kaj korespondados inter si, por pretigi ĉion kiel eble plej bone, plej majeste kaj plej frue.

Komprenebie, la svisaj esperantistoj devas agadi en plena interkonsento kun la « Provizora Komitato de Organizado » ; ili devas ankaŭ peti konsilojn de Sro Michaux, kiu havas jam kelkan sperton.

Ĉar la plej grava celo de niaj kongresoj estas la *propagando*, tial laŭ mia opinio la afero nepre devas esti aranĝita tiamaniere, ke en ĉiuj kunvenoj kaj solenoj krom la esperantistoj povu partopreni ankaŭ kiel eble plej multe da *ne*-esperantistoj (kompreneble ne kiel membroj de nia familio, sed nur kiel *gastoj*, por difinita pago). Por tio oni devus kiel eble plej frutempe veki la intereson de la tuta mondo por nia kongreso per lerte kaj alloge verkitaj gazetaj artikoloj, pri kiuj kredeble zorgos la « Provizora Komitato de Organizado ». La komitato kompreneble ne devas forgesi dissendi kiel eble plej frutempe invitojn al ĉiuj plej gravaj gazetoj de la mondo (kaj ripeti tiun inviton (eble kun peto pri definitiva respondo) 6-8 semajnojn antaŭ la kongreso.

Kun kora saluto via

Varsovio, 2 - x - 05. ZAMENHOF.

* *

Private ni aŭdis, ke Dro Zamenhof ne sole venos al la kongreso, sed proponos tie tre gravan aferon, pri kiu li revis en la daŭro de tre multaj jaroj kaj kiu, malgraŭ sia granda graveco elvokos tamen nenian disputadon, ĉar ĝi konsistos nur en la kreado de aparta *sekcio*, al kiu ĉiu esperantisto povos aliĝi aŭ ne aliĝi laŭ sia propra bontrovo.

Esperantista Organiza Komitato

Por prepari kiel eble plej rapide la efektivigon de la decidoj de la unua internacia kongreso okazinta en Boulogne-sur-Mer de la 5a ĝis la 13a de aŭgusto 1905, aparte pri la starigo de la provizora *Lingva Komitato* kaj de la provizora *Komitato de Organizado*, la membroj de tiu ĉi lasta komitato ankoraŭ ĉeestantaj en Boulogne antaŭ ol forvojaĝi al tiu urbo kaj laŭ la insista peto al ili farita de Doktoro ZAMENHOF, prenis la jenajn decidojn, al kiuj poste aliĝis skribe la ceteraj membroj de la dirita komitato.

Por efektivigi unuecon kaj ordon en la laboroj kaj agoj de ambaŭ komitatoj sub la konstantaj direktado, kontrolado kaj inspirado de Doktoro ZAMENHOF, estas elektita oficeja sidejo sendependa de ĉiu jam ekzistanta esperantista grupo aŭ societo, kaj provizore fiksista en Parizo, 51, strato de Clichy.

La ofico de la korespondoj koncernantaj, ĉu la lingvan, ĉu la organizan komitaton estos alcentrigata per la zorgoj de la sekretario-agento de la oficejo, kiu havas la taskon sendi tiujn korespondojn al la koncernanta komitato kaj plenumi la donotajn sekvojn.

Provizore ankaŭ Sro Rektoro BOIRAC kaj Sro Generalo SEBERT, laŭ la deziro de Dro ZAMENHOF mem, kiu tre deziras la malpliiĝon de la laboro kiu lin premas, ĉiujn korespondojn pri demandoj rilataj al Esperanto de la komitato kiun la afero koncernas, per adreso de la centra oficejo, kaj evitante kunmiksi sur sama folio demandojn samtempe rilatajn al ambaŭ komitatoj aŭ eĉ al diversaj aferoj.

La Esperantista Organiza Komitato : Dro ZAMENHOF, *Prezidanto* ; Sroj BOIRAC, MICHAUX, MYBS, POLLEN, SEBERT, *Vicprezidantoj* ; Sroj BOULET, DERVAUX, GRABOWSKI, KÜHNL, *Sekretarioj*.

Adresoj uzotaj :

Por la *Organiza Komitato* :
Esperantista Centra Oficejo
Organiza Komitato, 51, Clichy, PARIS, IX.

Por la *Lingva Komitato* :
Esperantista Centra Oficejo
Lingva Komitato, 51, Clichy, PARIS, IX.

RESPONDO

Ni ricevas la jenan leteron, reponde kelkajn artikolojn presitajn en tiu gazeto kaj aliaj. La aŭtoro pardonos ke ni ne kredas utile doni al la respondo la saman publikecon kiel al la artikoj. Ni ĝin presas tute, sen la ŝanĝo. Niaj legantoj certe ŝatos, krom la intereso de la ideoj, la agrablan stilon esperantan de l'aŭ-

toro. — Kaj certe ili konkludos ke, se li skribas tiamaniere ankaŭ en *Volapük* kaj en *Idiom Neutral* kaj en kelkaj aliaj lingvoj, tia multlingvismo estas malofta luksaĵo, iom diferenca de la ordinara celo de internaciaj lingvoj.

* * *

Saranac Lake, N. Y., U. S. A., IX : 8. 1905.

Al Sinjoro Paul Berthelot en Céret,

Kara Sinjoro,

Via artikolo pri Idiom Neutral venas al mi kiel plenigo de via bonega devizo : *faru ion, kaj tion nur !* — aŭ, « se vi volas esti malbona knabeto kaj ludadi kune kun tiuj mallaŭdindaj volapükistaj kaj neutralidiomaj infanoj, ne pensu, certe, ke vi povos ankaŭ ludi kun ni, la fidelaj filoj de Zamenhof ! »

Mi ne plendas nek volas malkonfesi : sed vere, mi neniam intencis ke mia malespero pri la estonteco de I. N. estu tiel publikigita ! Se nur mi estis aldoninta la « inter ni » kiun mi videble forgesis ! Tamen mi ne koleriĝas : mi nur bedaŭras ke vi alkalkulas intencojn tiel malaltajn al ni, anoj kaj kreintoj de aliaj lingvosistemoj ! Vere ni esperas nek gloron nek riĉecon : maljuniĝintaj post longaj bataladoj por la ideo de lingvo internacia, eble perdintaj iel la fervoron de propagandistoj, ni preferas kviete konstrui, se ni povos, sistemon internacilingvan kiel eble plej bonan — OPTIMUM VIX SATIS — kiu eble helpos al la konstruo de « la internacia lingvo de l'estonteco » kiun S^ro Profesoro Boucon tiel bone priskribas en sia artikolo « Utilo de tutmonda lingvo ». Kaj tion vi nomas « malbona ago » !

Antaŭ 15 jaroj, ni volapükistoj argumentis : ĉar volapük nun estas multe disvastigita, estus bedaŭrinde provi anstataŭi ĝin per esperanto, lingvo certe *ne multe pli bona ol nia* ! Via argumento kontraŭ la propagando de I. N. ne estas nova, vi komprenis. Sed ĉu tia propagando vere ekzistas ? Cu ĝi « progresadas en Germanujo » ? Mi nenion aŭdis pri tia progresado. Krom sinjoroj Schmid (eksesperantisto), Hoffman, Frost kaj Lenze, la germanaj akademianoj, mi multe dubas ĉu dekduo da germanoj skribas aŭ parolas ĝin. Laŭ mia vidpunkto, la lingvo ne estas ankoraŭ perfektigita ; la akademio faras ŝanĝojn, kaj espereble faros multajn aliajn. Pro tiu kaŭzo, ni havas neniun literaturon, nek ĝisnune ni provis propagandi.

Kaj Esperanto ? Kiel internacilingvisto, mi ĝojas pri ĝia nuna disvastiĝo. Esperanto estas sendube tre interesa kaj, eĉ nun, profita. Sed ĉu ĝi, aŭ iu ajn alia nuna sistemo, vere fariĝos la internacia lingvo de l'estonteco ?

Kun plezuro mi legas ke D^ro Zamenhof, en la kongreso, bone parolis pri aliaj kreintoj de lingvoj, kaj aparte pri la servoj faritaj de la eltrovinto de volapük. Bedaŭrinde, aliaj esperantistoj ne ĉiam tiel agas. « *Multaj* eksvolapükistoj fariĝis esperantistoj » — eble, kvankam mi ne trovas la bone konatajn nomojn en via adresaro. Tamen, ilia nonbro estus sendube pli granda, se ili ne trovus en la gazetaro esperantista tiel multajn sensencajn kaj neakuratajn atakojn kontraŭ sian amitan sed nerevivigeblan sistemon. La « eksvolapükisto » legas, ke la malsukceso de « tiu abomeninda volapük » malhelpas la disvastiĝon de Esperanto ! — ke volapük estis « lingvo neelparolebla » (li komparas sian *nunodis valik* kun via *ĉiujn sciigojn !*) — ke la volapükistoj mem trovis la lingvon « ne obeema » kaj maltaŭga ! Kaj via « eksvolapükisto », muŝo kiu povus esti kaptita eĉ sen mielo, estas forpuŝita per tiom da senutila vinagraĵo ! — Ekzemple, via korespondanto kongresa « vidinto », por kolorigi sian imaĝon, prezentas al ni kelkajn neakurataĵojn en sia dua paragrafo. En la jaro 1889 okazis en Parizo la *tria*, ne la *unua* kongreso volapüka. (Vidu Couturat kaj Leau — Histoire de la Langue Universelle, pp. 147-150.) « Senfidaj al la kreanto, nek (?) al la kreaĵo... » kontraŭe, la kongreso nur difinis la rajton de la *datuval*-eltrovinto kaj fiksis la regularon de l'akademio... « Malbone servitaj de neobeema lingvo, incitataj de peniga kompreno kaj malfacila esprimo » — pri tio la ĉeestintaj nenion aŭdis — « la volapükistoj ne povis interkonsentiĝi kaj Schleyer, furioza, sekvata de kelkaj fideluloj foriris plaŭdigante la pordojn ». (! !!). La vero estas, ke ĉiuj malkonsentetoj inter la ĉeestantoj facile kaj bone estis finitaj, kaj oni legis leteron skribitan de S^ro Schleyer, *kiu bedaŭris ĉar li ne povis ĉeesti !* Mi bedaŭras ke tiuj necesaj korektigoj difektas la imaĝon kaj lasas tian lakunon en la paragrafo !

Antaŭ dekkvin jaroj, kiam volapük estis eble timiga konkuranto, oni povas kompreni kaj senkulpigi la kelkfojan troan kontraŭstaron de la esperanta preso kontraŭ ĝi — « *ĉio justa en amo aŭ en milito* » — sed nun estas pli bone, ĉu ne ? ke justeco estu farata eĉ al niaj volapükistaj antaŭuloj kaj laborintoj por la ideo de lingvo internacia ?

E. D. F.

PRI LA MALO

Ni ricevis pri tiu temo amasegon da leteroj, unuj kritikantaj la teorion de nia okaza kunlaboranto O. W., el kiuj ni publikigis du en nia lasta numero, aliaj kritikantaj la kritikistojn. Kvankam tiu disputado estas tre interesa, oni komprenos ke ni devas meti finon al ĝi, kies loko tute ne estas nia propaganda jurnalo. Ni do ĉesigos tion donante sube la respondon de S^o O. W. mem. *(N. d. l. R.)*

* * *

Mi plene konfesas kiel S^o A. E. el Bourges, ke la demando estas nur teoria kaj pro tio eble estus preferinde ĝin elvoki en alia gazeto ol *Esperanto*. Efektive la fundamento de mia teorio estas matematika kaj eble ne facile komprenebla de ĉiu : ĝuste tial mi ĝin prezentis nur kiel skizo de esploramanto kaj tute ne kiel propono de reformo. Sed mia honora kontraŭdiranto konfesos ke se la perfekteco de scienco ia mezuriĝas je la uzo kiun ĝi faras de matematiko, nia lingvo estas iom malproksime de la perfekta logiko. Cetere, tio ne estas ĝeno, kaj en la nuna stato de la ĝenerala klereco, ni povas tre facile kontentigi nin kun tiu proksimuma logiko kiu regas niajn lingvojn. Ja *malalta* estas sensencaĵo rilate pura logiko, sed kiom malmulte tio estas grava, se ni ĉiuj konsentas pri ĝia signifo kaj ĝin egale komprenas ?

Tamen... ĝi estas sensencaĵo, malgraŭ la scienca argumentado de mia samregnano S^o E. Cefeĉ. Li diras al ni ke : montaĉasisto nomos la ebenaĵojn kie kuŝas la urbojn ne *malaltaĵoj* (low) sed *profundaĵoj* (deep).

Li certe devus supreniri la montarojn de niaj skotaj *high-land*'anoj kiuj obstinas sin nomante tiujn lokojn *low-land*, tute kontraŭ lia teorio !

Ni do konfesu ke D^o Zamenhof, en celo ŝpari al niaj cerboj senutilajn malfacilajn filozofaĵojn, pliŝatis praktikecon ol neatingeblan perfektecon, kaj ni danku lin pro tio ĉar neniam aliel ni konus lian genian verkon.

O. W.

* * *

Estimata Sinjoro,

En mia respondeto de la 9^a n^o de Esperanto pri la MALO, la presistoj forlasis unu linion, *kio tute kripligis la frazon.* Cu vi bonvolos korektigi ĝin en la venonta numero kiel jene :

Efektive kiam oni diras ke iu objekto estas granda aŭ malgranda oni nur priparolas rilative, *kompare kun ia meza mezuro, sed ne absolute*, laŭ.....

Kun danko kaj saluto,

Via, A. E.

ESPERANTUJO

Ni ricevas la jenan komunikajon :

En la Bulonja kongreso ekvivis nova nacio, kies anoj vivas disege en diversaj landoj : nacio internacia. Kiel bele estus se tiu-ĉi nacio ankaŭ posedus landon, ian sanktejon, ĉu silentan, trankvilan arbareton, ĝardenon, parkon, ĉu ian pentrindan insulon meze de lago, kaj tio propraĵo de ĉiuj Esperantistoj estus. Centoj, miloj kaj eble iam milionoj da homoj pilgrimos ĉiujare en tiun-ĉi teran paradizon, dankan signon kuŝigante sur la altaron homaran.

Fondu ni komitaton ; kolektu ni fundon kaj serĉu lokon eble en Svisujo, kiun oni jam nomis estontan koron de la homaro, aŭ en alia lando, kaj esperu ni, ke ekestos iutage sanktegejo por ĉiuj popoloj, en kiu nur estados : Espero, Paco, Amo !

E. 8319.

BIBLIOGRAFIO

Kurso Tutmonda, laŭ la metodo natura, de Emilo GASSE, estas tre interesa verketo en kiu estas alfarita al Esperanto la universale konata metodo *Berlitz*.

Analizon de tia speciala verko estas preskaŭ neeble fari ; ni pliamas konsili niajn *ĉiulingvajn* samideanojn ke ili akiros kaj utiligos tiun rimarkindan libreton kiu permesas instruadon de esperanto en tiuj lingvoj je kiuj ne jam ekzistas lernolibro, kaj multe helpos al profesoroj de nia lingvo.

Tra la Mondo. — La 3^a n^o de la unua serio superas per beleco kaj intereso la duan, jam tiel rimarkinda. Pli ol 40 ilustrajoj akompanas la tekston.

Nova serio prepariĝas, ankaŭ tute posedinda :

1^o Numero dediĉita al Rusujo kaj Japanujo.

2^o Kristnaska numero, enhavonta rakontojn kaj kutimojn pri kristnasko en diversaj landoj.

3^o Sensacia numero novjara, kun, inter aliaj interesegaj artikoloj, tre rimarkinda novelo talente verkita kaj ilustrita de fraŭlino Oxenford, el Brighton.

Tiu bela serio, kiel la unua, estos facile havebla por ĉiuj, dank'al la kvaronjara abono (2 fr. 25).

POR PROPAGANDO

Ni havas kelkajn nevenditajn numerojn resenditajn de la vendistoj kaj tenejistoj. Tiuj ekzempleroj estas ne tre freŝaj, iom flaviĝintaj au makulataj, sed ankoraŭ tre taŭgaj por propagandaj celoj, kiel senpaga disdono, intenca perdo en legejoj, vagonoj, atendaj salonoj, por la hospitaloj kaj por ĉio kion povas eltrovi penso de lerta propagandisto. Ni povas ilin liveri *afrankite ĉe domo* por la jenaj prezoj :

POSTPAKETO DA :	DUA ELEKTO	UNUA ELEKTO
3 milgramoj (ĉirkaŭ 150 jurnaloj.)	2 50	4 »»
5 milgramoj (ĉirkaŭ 250 jurnaloj.)	3 70	6 20
10 milgramoj (ĉirkaŭ 500 jurnaloj.)	6 50	11 50

Supera elekto : tute freŝaj ekzempleroj. Unu cento : 6 fk., poŝto plie.

bona 1^e per si mem : kiu havas ĉiujn la ecojn proprajn al sia naturo, al sia difino = bona memoro, vido, farto ; bonaj versoj (korektaj) ; -landano obeas leĝojn ; - filo, edzo, - laboristo, - servisto akuras siajn devojn ; ironie : mi donos al li bonan venenon ; komp : tio estas - por perei | 2^e rilate al ni : kiu estas taŭga por la uzo al kiu ni ĝin difinas, aŭ por tio kion ni atendas el ĝi = bona tero, - laborilo, - lito, - vino ; maro, vento - por ŝipiri ; - eco (t.e. utila al ni) ; - konsilo, - ideo ; - pentristo, - kuracisto ; - gusto, - odoro ; muziko, kc. kompone : bonstato, bongusta, bonodora, bonsona, kc. | 3^e rilate aliu, pri homo, homaj pensoj kaj agoj liberaj : kiu havas la ecojn proprajn al la sociala naturo de l'homo = homo - estas tiu kiu penas fari por aliuj tion, kion li deziras por si mem ; li estas - kaj afable ; - ago ; - konduto, bonaj moroj, fari bonan uzon de io ; - konscienco, - intenco, - humoro komp : - animo, koro, parolo ; kompone : bonfaranto, bonintenca | -e : konforme al sia naturo, al sia difino, al sia celo = farti, vidi, memori bone ; paroli, labori - ; (tio estas) bone ! | rilate al ni : agrable = odori -, akordi - ; mi estas tre - tie ĉi | morale, socie : konforme al reguloj, al leĝoj = agi, konduti - | -o : morala perfekteco = la - konsistas el konformiĝo al la leĝo de l'devo.

borago veg. *(borrago)*.

borakso salo (natriborato hidrata).

borderi 2 almeti, alaranĝi, alkudri randajon = - tukon, - paperon per nigra strio ; - veston per punto.

bordo terrando apud akvejo = marbordo | **-vojo**, **-strato** : irejo laŭ la bordo en haveno, tra urbo, kc.

bori 2 enfari, trafari truon | **-ilo**, **-ileto** : truŝraŭbilo.

boro metalojda ŝtofo (Bo = 79,36)

borso negocejo, komercejo publika.

botaniko parto de la sciencoj naturaj kiuj rilatas la kreskajojn.

Oni dividas ĉiujn vegetajojn laŭ 4 grupoj :
1^e floruloj (unukotiledonaj, dukotiledonaj, nudsemaj),
2^e filikajoj,
3^e muskajoj,
4^e likenajoj (algoj, likenoj, fungoj).
Tiuj grupoj dividiĝas en klasoj, fakoj kaj subfakoj, gentoj kaj subgentoj, generoj kaj specoj. Fine en sama speco povas ekzisti diversaj rasoj.

botaŭro birdo *(botaurus)*.

botelo vazo je mallarĝa kolo, kutime vitra.

boto leda vestajo kovranta la piedon kaj parton de la kruro.

bovo mam. *(bos taurus)*.

brako membro supera ĉe homo kaj simioj | komp : brako de rivero | kompone : brakartiko, brakzono.

bramo fiŝo *(abramis brama)*.

branĉo disiĝa parto : - de arbo, - de radiko, - de rivero, de vejno.

brando alkoholajo ricevita per distilo de diversaj fermentajoj.

branko respira aparato de laj bestoj = fiŝoj, senpulmaj batrakoj estas -uloj.

brano restajo de kribita faruno, grenŝeloj.

brasiko veg. *(brassica oleracea)* | **flor-** : speco de brasiko kies abortiĝinta floraro estas manĝebla.

brava kuraĝa, sentima al danĝero | kompone : braveco, bravajo, bravulo, bravega, bravaĉa, kc.

breto tabuleto.

bridi deteni, malpermesi laŭvolan movadon | **-o**, **-ilo** : parto de kapjungajo kiu malpermesas troan movon = rimeno de brido, streĉi bridilojn.

briko kuirita argilo | **konstrua**, **tegmenta** - : diversformaj materialoj faritaj el briko.

brili 1 lumi tre forte kompare la ĉirkaŭajo = steloj -as en neluma ĉielo | **re-** : brili spegule = suno rebrilas sur kirasoj, rebrilo de luno en lageto.

briono veg. *(bryone dioïca)*.

brodi 2 ornami per enkudritaj reliefaj desegnoj.

brogi 2 elmeti je l'ago de varma vaporo | kuiri en fermita vazo = brogita bovajo.

bromo simpla ŝtofo metalojda (Br = 79,36)

bronko pulma aervojo ĉe superaj bestoj | **grandaj -oj** : ambaŭ aervojoj kiuj daŭriĝas la traĥeon | **malgrandaj -oj** : disforkajoj de grandaj b. | **-etoj** : lastaj branĉetoj kiuj finiĝas ĉe pulmaj ĉeloj | **-ito** : brulumo de la bronkoj.

bronzo kunfandajo diversproporcia de kupro* kun aliaj metaloj : stano, zinko, plumbo, aluminio, kc.

broso ilo formata el faskoj de fadenoj rigidaj kaj elastaj fiksitaj sur plato aŭ tenilo, kaj utilanta por purigi | **-i** : purigi frotante per broso | **har-ilo, dent-ilo, ĉir-ilo** : brosojn por purigi harojn, dentojn. por ĉiri, kc.

broŝuro nebindita libreto.

brovo arkajo superokula | hararo kiu ĝin kovras.

brui 1 eldoni sonon neprecizan, sonoraron konfuzan = arbaro -as, fonto -etas, akvofalo -egas ; oni aŭdis bruon de rompo. v. *soni*.

bruli 2 detrui per fajro = bruli paperon, ligno estas brulebla | **-iĝi** : esti detruata per fajro = la papero bruliĝis, alkoholo estas bruliĝema | **ek-igi** : inciti bruliĝon per almetata flamo, varmego, kc. = ekbruligi pulvoron, meĉon, kc.

Plej ĝenerale, oni diras ke ia ŝtofo *brulas* alian, kiam ili ĥemie kombiniĝas eldonante varmon kaj lumon ; se unu estas gasa, la alia bruliĝas en ĝi. Tiel karbo bruliĝas en okso, arseno en kloro, kc. Kutime oni diras ke io bruliĝas kiam ĝi tute aŭ parte kombiniĝas flame*, lume kaj varme kun la okso de l'aero.

bruna flavruĝo pli malpli nigra = kaŝtano, kafo brulita, okro malpala estas -j.

brusto antaŭa parto de l'korpo inter la kolo kaj la ventro.

bruto besto, kontraŭe al homo = bubalo estas - ; kelkaj homoj sin malaltigas ĝis - ; hundon, pro sagaco, ni ne devus nomi - | **-aro** : bestaro utiligita en kamplaborado.

bubalo mam. *(bos bubalus)*.

bubo petola knabo.

buĉi 2 mortigi metode | **-isto** : kiu mortigas kaj preparas la brutojn manĝotajn : bovo, ŝafo, ĉevalo, kc.

budo dometo, butiketo transportebla = safista - ; foira - ; -eto de gardsoldato.

bufo g. de batrakoj *(bufo)*.

bukedo fasko da floroj.

buklo meĉo de haroj volvita ringforme ; ĉio tiaforma.

buko speco de ringo metala kun pikilo utilante por fiksi rubandon = buko de zono, de banto.

bukso veg. *(buxus)*.

bulbo speciala ripoza formo de iaj vegetajoj : ajloj, lilioj, jacintoj, kc. | komune : speco de ajlo manĝebla *(allium cepa)*.

buljono akvo en kiu oni boligadis ion por eltiri de ĝi ĉion solveblan | komune : likva manĝajo preparita per bolado de viando kun aŭ sen legomoj kaj spicoj en akvo.

bulo objekto proksimume sfera.

burdo g. de ins. *(bombus)*.

burĝo historio : ano de la kasto meza inter la nobela kaj la popola.

burĝono unua formo de nova kreskanta parto sur vegetajo = folia, flora -.

busto la kapo kaj la supra parto de l'korpo ĝis la subŝultroj.

buŝelo mezurilo por sekaj materialoj ; (nuna pariza buŝelo = 10 litroj.)

buŝo supera enirejo de l'interna kavajo ĉe homo kaj bestoj | **-umo** : aparato malpermesante mordon = hunda, ĉasputora - | **-peco** : parto kiun oni metas en buŝo = - de fluto, de pipo, de ĉevala jungajo, kc.

buteo birdo *(buteo)*.

butero grasajo tirita el lakta kremo* | **-igilo** : aparato por disigi per batado la buteron de la selakto*.

butiko publika detala vendejo.

butono peceto el osto, metalo, kc. kiun oni alkudras sur vestajojn kaj kiu, eniĝante en respondajn ingojn permesas fermi aŭ malfermi tiun ĉi | **-umi, dis-umi** : fermi, malfermi per butonoj | **-truo** : fendo borderita farita en rando de vestajo por utili kiel butoningo.

C noto de muziko.

cedi 1 ĉesi kontraŭstari = la digo -is sub la premo de l'akvaro ; post longa rezisto, ŝi -is je mia petego | **-ema** : oni devas esti -ema kun maljunuloj.

cedro arbo *(cedrus)*.

cejano veg. *(centaurea cyanus)*.

celerio speco de apio kulturata.

celi 2 rigardi por atingi = celi birdon per pafilo, celi pejzaĝon per fotografilo | komp : deziri, direkti sian penon al : - la gloron ; en kia celo ? | **-ilo** : pinto, truo, linio, kc. kiun oni utilas por celi | **-o**, **-ajo** : kion oni celas.

cemento pulvo ricevita per kuirado de kalkŝtonoj enhavantaj de 30 ĝis 60 pro 100 da argilo kaj utiligata por konstruado en malsekaj lokoj.

Tiu miksajo de kalko* kaj argilo sekegaj formas je l'efiko de l'akvo, tute nesolveblan kalcialuminisilikaton tre malmolan. Miksate kun sablo, ĝi donas subakvan morteron*.

cendo monero ; amerika cendo = 5 c. 1/4 ; belga cendo = 2 centimoj.

centro punkto de simetrio* = centro de rondo, de sfero, de kvadrato, de kubo, kc.

cerbo amaso da nervajo kiun enhavas la kapo de superaj bestoj | **-eto** : posta parto de la cerba maso.

cerio metala ŝtofo (Ce = 139,2).

certa nepre vera, kiu ne povas esti falsa, pri kiu ne estas eble dubi = lia morto estas afero - ; estas certe ke du kaj unu estas tri | **-igi** : igi -, nedubebla = tio -igis al mi lian kulpecon ; mi -igas al vi (aŭ vin), ke...

cervo mam. *(cervus elaphus)* | **norda -** : mam : *(rangifer)*.

cetera kiu estas ekster la nombro de la konsiderajoj = kelkaj birdoj falis je la pafo, la